


1971
no. 4

# JEN BULTENO

esprimilo de la Junularo Esperantista
de Nord-Ameriko


LA REĜO DE UMO
ILUSTRITA FAR VINCE CARSON
VERKITA FAR LA PAPAGO
EŬROPO VERŜAJNE BALDAŬ PAROLOS LA USAN.
STULTEGE! KIEL NE LA UMAN DIABLE.
ĈAR LINGVO
LA USA ESTAS GRAVA EN KOMERCO, INDUSTRIO, LITERATURO, SOCIOLOGIO, REGISTRADO, TURISMO, BANKADO, SCIENCO, MATEMATIKO...
EKONOMIO, RELIGIO, ĴURNALISMO, KOMUNIKADO,
TEATRO, ELDONADO, KAJ MEDICINO, SED EN KIO GRAVAS LA UMA?
EN UMLANDO!!

Thank you for looking into JEN-Bulteno!

Are you interested in helping to solve the world language problem? In reducing the annoyance, extra work, lost money, and even human suffering that can result from lack of communication? Would you like to learn a language that has no irregular verbs, that is spelled phonetically, and that can be learned quickly? If your answer to these questions is "yes," do yourself a favor: Find out more about Esperanto, the international language. You might start with the article in Encyclopaedia Britannica. For more information and suggestions on how to get involved, write to:

Esperanto Information Center, Dept. JB
410 Darrell Road
Hillsborough, California 94010.

JEN-Bulteno is the quarterly magazine of the Young Esperantists of North America (Junularo Esperantista de Nord-Ameriko).

The purpose of our organization is to encourage the use of Esperanto among Americans under 30. Our magazine publishes articles by JEN members and guests because the possibility of being published is a pleasant inducement to language study, and because we share an interest in language, travel, literature, linguistic discrimination, education, and other areas of international importance. Won't you join us?

Please turn to the back of this sheet for an introduction to Esperanto as a living language.

# How Esperanto Works

Esperanto is a living language. It has a spoken and a written form, and, like any other language, it can describe the full range of human experience. While Esperanto has the same capabilities as other languages, it has been designed for simplicity and ease of learning.

## The Alphabet

The Esperanto alphabet is similar to the English, but it adds the letters ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, and does not have q, w, x, y.

## The Sentence

The Esperanto sentence is quite similar to the English in structure: subject-verb-direct object: I- like-ice cream; Mi-ŝatas-glaciaĵon. To ask a question, either start with a question word (what, when, etc.) or use the question-signal, "cu" followed by the statement.

Kie-vi-estas?
Where-you are? or, Where are you?

Ĉu-vi-skribis-la-leteron?
Question signal- you-wrote-the letter?
or, Did you write the letter?

## Pronouns

The subject pronouns are: mi (I), vi (you, singular and plural), li (he), ŝi (she), ĝi (it), ni (we), ili (they).

## Verbs

All verbs are regular, and are based on a root. Tenses are shown by endings. The same form serves for all persons in a tense, much as in English. For example, let's conjugate the verb "to love", ami: mi amas (I love), vi amas (you love), li amas (he loves), ŝi amas (she loves), ĝi amas (it loves), ni amas (we love), ili amas (they love). We can follow the same pattern with other tenses. (The root is underlined for emphasis.) amis (loved), amos (will love), amus (would love), amu (love, command form). Compound tenses are rare.

## Other Parts of Speech

Nouns end in o, adjectives in a, for ease of recognition. Both are pluralized by adding j. Adverbs end in e. For example: belo (noun), beauty; bela (adjective), beautiful; bele (adverb), beautifully. Bela infano, beautiful child. Belaj infanoj, beautiful children. bele pentrita, beautifully painted. Pentrita belo, painted beauty. As with the verbs, Esperanto nouns, adverbs, and adjectives are based on roots.

## Direct Objects

The direct object, or accusitive case, is shown by the addition of n to a noun or adjective. La hundo bojas, the dog barks. Mi vidas la grandan hundon, I see the big dog. Ĉu vi deziras studi Esperanton? Do you want to study Esperanto?

## Prefixes and Suffixes

A system of regular prefixes and suffixes allows expansion of an elementary vocabulary (always a problem for beginners) for greater expressiveness. Some examples: Pluvo, rain; pluveto, shower or drizzle; pluvego, downpour; pluvero, raindrop: pluvadi, to rain on and on. Pura, clean; malpura, dirty; malpuraĉa, disgustingly dirty; purigi, to clean; puriĝi, to get clean, to clean one's self up.

Letero de la redaktoro:

Pro tio ke ĝis la fino de tiu ĉi jaro mi estos la redaktoro de la JEN-Bulteno, mi deziras esprimi kelkajn pensojn al vi, la legantoj. Tiu ĉi numero montras kaj la fakton ke mi konstruas sur la laboro de S-ro Gary Mickle kaj ke mi faras kelkajn eksperimentojn, celante plibonigi la revuon por ĉiuj.

Inter la plej evidentaj el la eksperimentoj kiuj mi faris en tiu ĉi numero estas la dukolumna paĝ-formato, la rubrikrepreso el Japanujo, kaj la reenkonduko de la "Reĝo de Umo," verkita de La Papago kaj ilustrita de Vince Carson.

La flava paĝo kiu anglalingve prezentas Esperanton kaj JEN'on ne formos parton de la revuo ĝenerale; ĝin entenos nur specialaj ekzempleroj kiujn ni sendos al universitataj kaj liceaj bibliotekoj, kaj al aliaj instancoj dum la venontaj monatoj.

Mi esperas ke vi esprimos viajn opiniojn pri la Bulteno per leteroj al mi. La plialogigon kaj pliutiligon de nia revuo mi povas realigi pli efike se mi havas vian helpon.

Amike via,

Erik J. Felker

La redakcio de JEN-Bulteno deziras esprimi sian dankemon al ĉiuj gekontribuantoj, sed aparte al la Gesinjoroj Daniel Mason, niaj stenciltajpistoj, al F-ino Ellen Lewis, nia korespondserva perantino, al Vince Carson, kiu tre amuze ilustras "La Reĝo de Umo," al La Papago, kiu verkas "La Reĝo," al la fratinaro instruista de la misia lernejo Mission Dolores, kiuj afable multobligas la bultenon, kaj al S-ro Anthony Hajdik, kiu bele desegnis la novan kovrilpaĝon.

DENSA

DENSA estas internacia federacio de stultuloj kiu klopodas la partoprenadon de malinteligentaj personoj kaj de malinteligenteco en la moderna mondo, kaj instigas kontakton inter stultuloj de ĉiuj rasoj, nacioj, klasoj, religioj, kaj lingvoj.

En niaj rondoj troviĝas multaj homgravaĵoj kiel ekz. politikistoj, desegnistoj de aŭtomobiloj kaj de virinaj vesto, generaloj, UNO-sekretarietoj, misiistoj, redaktoroj de noveska junulareskaj revuoj, ktp.

DENSA, tamen, ne estas klubo kiu maldiskriminacie ĉiun bonvenigas. Nur personoj kun inteligenteco malpli alta ol 85 laŭ la testo "Stanford-Benet" rajtas anigi. Ĝi estas, do, elitema klubo, vera stultaro.

DENSA nun forĝadas ĉenerojn kun la Esperanto-movado, laŭ teorio, ke Esperanto estas facila lingvo, lernebla eĉ de malinteligentaj personoj, kaj do trafega por antaŭenigi la celojn de internacia stulteco.

DENSA bonvenigos malinteligentajn Esperantistojn al ĝia amika rondo, samkiel la Esperantistaro bonvenigu DENSAulojn al ties rondo. Se via inteligentkvociento sufiĉe malaltas, aŭ se vi havas sufiĉe malspritajn amikojn proponindajn, tuj sedu la nomon kaj adreson al DENSA kaj petu inteligentec-teston de la DENSA representanto en via regiono!

La Papago.

>Pli pri Religio

Alproksimigante al mia trideka naskiĝdatreveno, mi ĉesigu mian mallaboremon kaj verku artikolon por la JEN-Bulteno. Jen publika letero al Doug Montgomery kaj Gary Mickle. Laŭ aforismo-parodio, "Ĉiu havas rajton al mia propra opinio." Kaj laŭ la juda proverbo, "Dek judoj, dek unu opinioj." Do, ne estas mirinde ke estas multe da konceptoj pri Dio, aŭ pri justeco, libero, ktp. Kion mi diru titole: ĉu "Dio, laŭ Ellen Lewis, je la tria posttagmeze"?

Gary, ŝajnas al mi ke vi direktas neparolatan demandon al tiu pastro: "Kiel eblas ke vi estas tiel naiva, ke vi efektive kaj daŭre havas tiun absurdan kredon je Dio? Mi estas juna inteligentulo kaj intelektulo, kaj, kompreneble, ateisto; kaj antaŭ ol vi diras ion ajn, mi jam malakceptos kaj eĉ mokos vian kredon kaj vin!" Tio ne kondukos al dialogo.

Kaj vi, Doug, jam konvinkita, laŭ mia supozo, ke vi estas savita; vi jam scias ke la katolikoj kaj aliaj kristanoj havas alian sintenon aŭ doktrinon ol la via; kaj ili estas sinceraj homoj. Tamen, kiam iu evangeliisto asertas al mi, "La Biblio diras..." mi respondas, "Kiel vi scias ke la Biblio estas la Vorto de Dio?" Tre malofte havas li (aŭ ŝi) respondon akcepteblan al mi; sed jen denove, ŝajnas al mi ke mi aŭdas neparolitan respondon: "Mi komence kaj fide akceptas la Biblion tiel." Sed al mi necesas fariĝi laŭeble nedisputema pri religio aŭ politiko--aŭ muziko aŭ lingvoj aŭ Esperanto! Ni ĉiuj devas lerni aŭskulti unu la alian, esti pli recivemaj kaj pli interesataj (ne nur toleremaj) pri la ideoj, opinioj, kaj sintenoj de aliaj homoj. Kaj tiu tasko estas tre malfacila, almenaŭ al mi.

Kiam mi estis antaŭadoleska infanino, mi konsideris min ateistino-- sed ne kontraŭteistino. Mi ne sciis tiujn vortojn; mi nur diris al mi, "Kelkaj homoj kredas je Dio; aliaj ne-- mi ne." Poste mi fariĝis liberala kredantino, kaj antaŭ malmultaj jaroj mi iĝis Reforma Judino jaj Uniterian-Universalistino. Dum iom da tempo la Baha'a kredo interesis min, kaj mi havas grandan respekton por la Baha'anoj.

Gary, estas multaj nekredoj, kaj viaj tri kategorioj estas tro simplaj. Nu, kiu estus divininta ke mi fine baptiĝos Romkatolikino? Se la Dua Vatikana Koncilo ne estus okazinta, verŝajne mi neniam konvertiĝus-- sed kiu scias? Al mi restas evidente, ke mi neniam fariĝos nekatolika Kristano (mi evitas la vorton, "Protestanto"), sed la ekumena movado daŭras. Do, ekzemple, vi, Gary, eble restos ateisto aŭ nekredanto, kiel Bertrand Russell, kaj eble fariĝos Kristano, kiel C. S. Lewis, kaj eble-- sed denove, kiu scias?

Fine, jen kelkaj vortoj rilate al la Biblio. Ni ne timu ĝin! T. H. Huxley skribis, "Ekzistas neniu leĝokodo, ĉu antikva aŭ moderna, samtempe tiom justa kaj tiom kompata, tiom milda al la malfortuloj, kiel la juda leĝo." Legu la

dek-naŭan ĉapitron de Levidoj-- jen revoluciaĵoj! Nuntempe, multaj klerulej en Usono, Israelo, kaj aliaj landoj, studas la Biblion kaj la biblian epokon. Inter tiuj kleruloj estas hebreoj, kristanoj, islamanoj, agnostikoj,.. ĉiaj! Krome, la biblia studo estas tre populara ŝatokupo en Israelo (kvankam malmultaj Israelanoj estas "religiemaj"-- memevidente!) En la revuo Ĥadassah, la organo de la samnoma virina cionisma organizaĵo, mi eĉ legis artikolon kun la titolo "Biblia Konkurso en Israela Mallibereĵo."

Do, al ĉiu leganto: Sekvu vian konsciencon, kaj memoru ke via proksemulo (!) faras same, eĉ se vi ne komprenas ĝin. Klopodu efektivigi ekvilibron inter blinda akceptado de via edukado kaj kolera ribelo kontraŭ ĝi. Kaj memoru, ke vi ne sukcesos devigi iun akcepti Kriston aŭ nei Dion (aŭ lerni Esperanton!) Tiel mi konsiladas vin, kun kiom da sukceso mi ne scias.

Finfine, mi gratulas vin, Gary, pro via laboro kiel redaktoro de la JEN-Bulteno, kaj deziras al vi sukceson en la estonteco.

Ellen Lewis

* * *

SE VI NE ESTAS PARTO

DE LA SOLVO, VI ESTAS PARTO DE LA PROBLEMO!

* * *

## Anoncetoj de la Membroj

S-ro Gary Mickle anoncas sian novan adreson dum sia studjaro eksterlanda:

S-ro Gary Mickle
34 Göttingen
Stauffenbergring 4-6
Alfred-Delp-Hans
(West) Germany.

S-ro Craig Koukol estas radioamatoro (WB9FNM). Li deziras havi kontakton kun aliaj radioamatoroj en JEN.

"Ni, homoj" far Ora Papilo (el La Nova Tajdo, organo de la Tokia Esperantista Junulara Asocio.)

En la unua parto de tiu ĉi artikolo mi prezentis la kondiĉojn, laj kiu scienculoj distingas la homon de aliaj bestoj. Krom ili estas specialaj trajtoj ne sciencaj, tamen pli interesaj.

Unue oni povas prezenti: "Nur la homo ridas." Laŭ fama psikologo Bergson la motivo de la rido estas momenta superemo. Nome, kiam iu ridas rigardante ies fiaskon, tiu havas la memfido ke li mem ne farus saman fiaskon. Ĉu aliaj bestoj ne sentas tian superemon? Mi ne estas certa pri tio, sed mi vidis aliajn bestojn ridantaj en... televidaj dramoj por infanoj. Ili estas ĉimpanzo, ĉevalo, eĉ delfeno, k. t. p.

La homo prezentas siajn proprajn trajtojn kaj eĉ strangeco jn pri seksaj aferoj.

Lastatempe oni povas trovi abundajn aferojn pri strangaj kaj specialaj inklinoj de de seksaj aferoj: sadismo, masoĥismo, samseksula amo, k. t. p.

La famkonata filozofo en antikva Grekujo, Platono, klarigis la sekson bele kaj interese en sia verko. Laŭ li la homo estas unu el la vivaĵoj, tial tiu ne povas vivi eterne; sed la homo havas la deziron eternigi sin per restigo de siaj idoj heredantaj liajn karakterojn je figuro simila al li mem. Ĉar kompreneble la homo sola ne povas restigi tiajn idojn, tiu devas elekti la plej alte taksitan unuopulo, kun kiu tiu kreas siajn idojn. Laŭ Platono tio estas la motivo de amo al unu definita aliseksulo.

Sed, ĉu nur la homo havas tian inklinon? Mi aŭdis ke en bestĝardeno ofte estas tiaj bestoj kiuj, kvankam vira kaj ina, tute ne plaĉas unu al la alia, kaj ne faras seksumadon, aldone eĉ batalas malame.

Ĉiu vivaĵo havas la instinkton prosperigi sian specon, tial ĉiu havas seksan deziron. Tio estas facile komprenebla kaj tute natura. Sed en la okazo de la homo, seksaj aferoj havas iom alian signifon. Pripensu supre menciitajn strangajn inklinojn de la homo. Ĉu la samseksula amo utilas al la prospero de la homo? Aŭ, eĉ oni praktikas specialajn rimedojn por eviti gravediĝon, kaj por tio ofte uzas evitilon, do la homo uzas ilon ankaŭ en tiu kampo. Pro tiaj aferoj oni povas kompreni ke la homo faras seksumadon ofte nur por ĝuo.

Estas aliaj specialaĵoj pri seksumado de la homo. Laŭ iu pornografaĵo: "Nur la homo seksumas frontante unu kontraŭ la alia, ventro-sur-ventre," kaj "nur ĉe la okazo de la homo ino rajdas sur viro dum seksumado." Oni ja nomas la nunan tempon la epoko de virino super viro.

Leginte ĉi tion ĝis tiu ĉi parto mi trovis ke mi iom post iom malseriloziĝas, kaj malkovriĝas mia interna penso. So mi plue skribos ĉi tion, certe nia kara redaktorino ne permesos aperigi ĉi tion sur la organo. Sed se vi, viro aŭ virino, havas intereson pri tiaj temoj, bonvolu veni ĉe mi, kaj ni interŝangu niajn opiniojn.

(Noto de la redaktoro: oni povas skribi al la Ora Papilo ĉe Tokia Esperantista Junulara Asocio, 2-1, Yonban-tyo, Tiyoda-ku, Tokio, 102, Japanujo.)

## Deziras Korespondi

S-ro Jorge Carlos Pereira Felipe, Rua Belo Monte 561-Rocas, Natal, R. N., Brazilo.
Li estas 16-jara kursgvidanto. Li deziras korespondi kun usonaj gejunuloj.
Jen ankaŭ liaj ekskursantinoj, kiuj ankaŭ deziras praktiki la lingvon per korespondado:

Eloine Maria Costa
Rua Otoniel Menezes, 292
Stos. Reis, Natal, R. N. Braz.
13-jara.

Icleia Maria da Silva
Rua Belo Horizante, 360
Rocas, Natal, R. N.
Brazilo
20-jara.

Ivonilda Cordula
Rua São Francisco, 25
Rocas, Natal, R. N.
Brazilo
16-jara.

Edna M. B. Santos
Rua São João, 160
Rocas, Natal, R. N.
Brazilo
22-jara.

Nilza V. Dantas
Rua Otoniel Menezes, 66A
Stos. Reis, Natal, R. N.
Brazilo
27-jara.

Telma M. Cruz
Rua São Francisco, 13
Rocas, Natal, R. N.
Brazilo
13-jara.

Maria C. Souza
Rua Sebastião, 73
Rocas, Natal, R. N.
Brazilo
16-jara.

Maria da Luz
Rua Lucas Bicalho, 70B
Rocas, Natal, R. N.
Brazilo
21-jara.

Lingva Imperialismo dum Antikvaj Tempoj
(Elangligo de parto de <u>La Mondo de la Inkaoj</u> de William H. Prescott.)

Alia rimedo estis de karaktero pli aŭdaca kaj originala. Temis pri nenio malpli ol la revoluciigo de la lingvo de la lando. Suda Ameriko, kiel Norda, dividiĝis per granda kvanto da dialektoj, aŭ pli ĝuste lingvoj, havante malmulte da simileco unu kun la alia. Tiu cirkonstanco okazigis grandan embarason al la registaro (la Inkaoj) rilate al la administrado de la provincoj, kies lingvojn oni ne konis. Oni decidis, do, anstataŭigi unu universalan lingvon, la keĉuan, la lingvo de la kortego, la ĉefurbo kaj la ĉirkaŭĉefurba kampar- la plej riĉa kaj ampleksa el la sudamerikaj dialektoj. En la urboj kaj urbetoj tra la lando proviziĝis instruistoj kiuj devis doni instruon al ĉiuj, eĉ la plej humilaj klasoj; kaj la registaro ankaŭ indikis ke oni ne kapablus leviĝi al posteno de digno aŭ profito sen kono de tiu lingvo.

La "kurakas" (provinciestroj) kaj aliaj ĉefuloj kiuj dum iom da tempo loĝis en la ĉefurbo, kutimiĝis al tiu lingvo per sia interrilato kun la kortego, kaj okaze de sia hejmreveno, ili fariĝis ekzemploj per sia konversacio. Tiun ekzemplon imitis iliaj regnanoj, kaj la kuĉua grade iĝis la lingvo de eleganto kaj modo, kiel la normanda franca lingvo uziĝis de ĉiuj kiuj aspiris je iu konsidero en Anglujo post la (normanda) konkero.

Per tiu rimedo, kvankam ĉiu provinco konservis sian individuan lingvon, prezentiĝis bela interŝanĝilo kiu permesis al la enloĝantaro de unu parto de la lando interrilaton kun ĉiu alia parto, kaj permesis al la Inkao-imperiestr- kaj liaj anstataŭuloj komuniki kun ĉiuj. Tiel staris la afero kiam la hispanoj venis. Oni devas diri ke historio liveras malmultajn ekzemplojn de pli absoluta povo ol tiu revolucio en la lingvo de imperio, laŭ la ordono de unu mastro.

* * *

Tiu ĉi sekcio estas
malplena ĉar vi ne
sendis artikolon,
recenzon, tradukon
ludon, leteron, aŭ
alian kontribuaĵon
al JEN-Bulteno.
Partoprenu kaj kunĝuu!


---

JEN-Bulteno, revuo de la Junularo Esperantista de Nord-Ameriko.

magazine of the Young Esperantists of North America

Redakcio / Editor

Erik J. Felker
731 Birmingham Road
Burbank, California 91504
U. S. A. -- Usono




FIRST CLASS

ADDRESS CORRECTION REQUESTED